



OOMOTO

INTERNACIA

Monata organo de la UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

Sidejo : 4, rue de Vaugirard, PARIS (VI^e)

Jarabono por Francujo : 5 fr. fr.

Redaktoro : K. NIŠIMURA

Jarabono por aliaj landoj : 2 sv. fr.

Satzungen des Weltverbandes für allgemeine Menschenliebe

Zweck der Vereinigung

Die UHA wurde gegründet mit dem Zwecke, durch die Förderung und Stärkung des Glaubens eine Verbrüderung und Vereinigung der gesamten Menschheit zu erreichen. Sie will mit Liebe und Güte arbeiten und strebt die Errichtung einer idealen Welt an, wo dauerndes Glück und Freude herrschen.

Jeder Mensch hat seinen eigenen Glauben und hofft auf eine kommende Zeit, wo Glück und Freude alle Teile der Welt erleuchten werden. Hierzu ist es aber nötig, dass wir im wahren Glauben leben und uns ernstlich bemühen, unser Ideal zu verwirklichen.

Die Menschen sind alle gleichen Ursprungs, Gottes, und folglich sind wir Brüder. Wenn die Menschen schlicht zu ihrer ursprünglichen Natur zurückkehren würden, müssten sie zur allgemeinen Vereinigung gelangen. Obgleich alle Religionen irgendwie untereinander verschieden sind, z. B. in den Gebräuchen und Kirchen, muss doch ihr Ursprung und Ziel gleich sein. Aber die heutige Menschheit errichtet, sei es wegen der Unterschiede in Rasse, Nationalität, Glaubensbekenntnis, oder aus anderen unwesentlichen Gründen, unbewusst Mauern zwischen sich und entfernt sich so mehr und mehr vom wahren Glück und Frieden, was wir aufs Tiefste bedauern.

Wir wenden uns nicht nur an die Anhänger der verschiedensten Glaubensbekenntnisse, sondern alle, die mit uns einer Meinung sind, werden aufrichtig gebeten, sich untereinander die Hände zu reichen, den wahren Glauben zu bekennen und dem Glück und der Freude der gesamten Menschheit zuzustreben. Dazu soll uns die soeben gegründete Vereinigung dienen.

Organisation

1. Die UHA hat ihren Hauptsitz in Ajabe, Kioto-fu, Japan.
2. UHA besitzt ein Komitee, das sich aus den folgenden Verwaltungsbeamten zusammensetzt:
 - a) Ein Hauptleiter,
 - b) Mehrere Komiteemitglieder.
3. UHA wird nach Bedarf Filialen in den einzelnen Ländern unter Leitung nationaler Vertreter errichten.
4. Die Mitgliedschaft ist frei und ohne Formalitäten.
5. Die Einnahmen der Gesellschaft setzen sich aus den Beiträgen der unterstützenden Mitglieder zusammen.

Arbeitsprogramm

1. UHA veranstaltet nach Bedarf seine Weltkongresse.
 2. Die Mitglieder treffen sich an ihren Wohnorten und tauschen ihre Meinungen aus, um den Glauben zu stärken und die Prinzipien in die Tat umzusetzen.
 3. Von Zeit zu Zeit gibt die UHA Broschüren heraus und Propagandblätter zur Information über die Gesellschaft.
 4. UHA veranstaltet Vorträge, Zusammenkünfte und Sitzungen mit praktischen oder propagandistischen Zielen.
 5. Nach Bedarf schickt die UHA Sachverständige nach den verschiedenen Ländern.
 6. Die Mitglieder sollen den Glauben Andersgläubiger achten und sich bemühen, einander zu helfen.
 7. UHA wird versuchen, auf gesetzlichem Wege Verbesserungen auf dem Gebiete der Religion, Erziehung und des sozialen Lebens einzuführen.
 8. UHA nimmt Esperanto als internationale Hilfssprache an.
 9. UHA gibt eine Monatsschrift in Esperanto heraus.
- Hauptleitung : S-ro Sengecu Deguci in Ajabe.
Zentralleitung : S-ro Koogecu Nišimura.

Adresse der UHA

Oomoto-Oficejo, Ajabe, Japan.

(Germana traduko de niaj Statutoj.)

Letero de Sankta Sinjoro Deguci al S-ro K. Nišimura

Propagandisto de Oomoto, en Parizo

15 nov. 1925.

Post longa intertempo de via foriro mi nun skribas al vi, mia plej amata propagandisto, S-ro K. Nišimura, kiu klopodas por la fratiĝo de la homaro en malproksimo de sia hejma lando.

Kun ĝojo mi vin informas pri niaj progresoj. Oomoto havas nun pli ol tricent filiojn en Oriento, faranta ĉiutage novajn progresojn. Centra Oficejo de Universala Homama Asocio konstruiĝis kaj jam pluraj filioj estas fonditaj. La «Ligo de Religioj» plifortigas ĉiutage. En Kameoka oni ekhavis trietaĝan domegon por tie aranĝi Esperantajn kursojn.

Japanaj kaj alilandaj eminentuloj vizitadas min, aprobante mian agadon...

Mi aprobas vian proponon rilate al fondo de Eŭropa Propaganda Oficejo en Parizo...

Koncernante nian proceson, mi povas informi vin, ke la Japana Supera Tribunalulo nuligis ĉiujn antaŭajn verdiktojn, aranĝante novan enketon pri Oomoto...

Dia favoro ĉiutage pliintensigas en mi, mi estas sana kaj servadas Dion feliĉe kaj kontente...

Bonvolu pardoni mian prokraston rilate al korespondado, sed tiu ĉi estas la sola letero, kiun mi skribis proprane en tiu ĉi jaro.

Plej sinceran saluton al ĉiuj karaj gefratoj en Eŭropo! Vi vin gardu, klopodante por la Dia Evangelio.

ONISABRO DEGUĈI.

(Traduko el japana lingvo de K. Nišimura.)

« Mi vidas, ke bovo, ĉevalo, hundo, koko kaj aliaj bestoj faras sian komunan blekon sendepende de regnoj: ili havas internacian parolon. Homoj nekompantaj Esperanton, neniel superas tiujn bestojn. »

Tondra aplaŭdo sekvis tiun ĉi parolon de Sankta S-ro Deguci dum Publika Paroladkunveno, aranĝita en la 13-a Japana Esp. Kongreso.

Az Altalános Emberbarát-Egyesület alapszabályai

Cél

Az Altalános Emberbarát-Egyesület célja az emberiség egységének és a Világbeke megalapításának a megteremtése. Ezt a célt a hit elmélyítésével óhajtjuk elérni. A szeretet és a jószág a mi vezéressilágunk. Az Emberbarát-Egyesület célja továbbá egy eszményi világ megszervezése, amelyben minden egyén meg fogja kapni az őt megillető részt a javakból, képességei szerint.

Mindenkinek megvan a saját hite, ki-ki várja az új világ eljvetelét, amikor mindenki megkapja a maga részét az örömben és a boldogságban. De, hogy ide eljussunk, szükséges, hogy egyesüljünk a közös reményben, a közös hitben és a közös akarásban. Minden ember egyazon törzsből származik. Minden ember Isten fia, tehát mindannyian testvérek vagyunk. Ha az emberiség valamilyen módon visszatérne a kezdetleges állapotába, a körülmények kényszere alatt a testvériség rögtön megteremtődne. Ugyancsak, minden vallás egyazon törzsből származik, valamennyi megegyezik a célt illetően, a külsőségek a vallások között csupán formaiak. A mai emberiség nemzetiségekre, fajokra, felekezetekre stb. van szétosztva, és a mi legnagyobb sajnálatunkra, napról-napra távolodik az eredeti egységtől, a békétől és a boldogságtól. Nem csupán a vallásosakhoz és a hívőkhöz, hanem mindazokhoz akik velünk éreznek, szól a mi szívatunk! Jöjjetek hozzánk, szerezzetek meg az igaz hitet és dolgozzatok az emberiség jobb korának a megteremtésén.

Ezekben áll a jelen Egyesület jellegéje.

Szervezet

1. Az A. E. E. központi irodája Japán Kioto-fu Ajabe városában van.
2. Az A. E. E. tisztikara a következő:
 - a) Egy választmányi elnök;
 - b) Egy meghatározott számú tagokból álló választmány.
3. Az A. E. E. a szükséghez képest nemzeti választmányokat és fiókokat alapít.
4. Az A. E. E. -hez való csatlakozás teljesen szabad és nincs semmiféle formalitáshoz kötve.
5. Az A. E. E. bevételét tisztán az alapító tagok befizetéséből folynak be.

Gyakorlati Program

1. Az A. E. E. a szükséghez képest Kongresszusokat rendez.
2. A tagok az egyesületi helyiségekben összegyűlnek hogy gondolataikat kicseréljék, hitüket megerősítik, elveiket valóra váltják.
3. Időnként az A. E. E. füzeteket és más nyomtatványokat ad ki, melyek propaganda célra szolgálnak és az egyesületekre vonatkozólag adatokat tartalmaznak.
4. Az A. E. E. propaganda gyűléseket, felolvásokokat és összejöveteleket rendez.
5. Az A. E. E. a szükséghez képest hivatott egyéneket küld ki a külföldre a propaganda elmélyítésére.
6. Tagjaink minden felekezetnek tisztelettel tartoznak, igyekezniük kell tehát azokkal együtt haladni.
7. Az A. E. E. mindent elkövet, hogy a vallást, a tanítást és más közhasznú intézményeket megajvítsa.
8. Az A. E. E. elfogadja az Esperantót, mint nemzetközi segédnyelvet.
9. Az A. E. E. havonta megjelenő és Esperantó nyelven szerkesztett újságot ad ki.

Választmányi elnök : Sengecu Deguci Ur.

A központi választmány nevében : Koogecu Nišimura.

Az A. E. E. címe

Oomoto-iroda, Ajabe, Japán.

(Hungara traduko de niaj Statutoj.)

NI VIVU EN NOVAJ SPIRITAJ FORTOJ !

Sinjoro Svatfordo ekstaris ĉe la tribunuo kaj faris jenan belan paroladon :

« Karaj gekredantoj !

Sankta estas la hodiaŭa tago, en kiu ni festas la revivigon de nia Majstro Sinjoro Jezuo Kristo. Ni ne povas resti sendankemaj por la granda favoro, kiun ni havas : laŭdi kaj beni la tagon en tiu ĉi belega preĝejo. Kaj ni, karaj gefratoj, devas pasigi la gloran tagon en kiel eble plej signifoplena maniero. Ni devas vivi en la freŝa movado religia, kiu sola estas taŭga por gvidi la nunan epokon, forigante la ŝelojn de la mortintaj religioj, kiuj sin montras tute burĝaj aŭ sin ornamas nur per tradicioj kaj legendoj.

Nia grupo jam tramarŝis kelkdekojn da jaroj de post sia fondiĝo, esperante la revenon de Sankta Kristo. Mi pensas, ke Li aperos en plej proksima tempo. Mi kredas ankaŭ, ke la revenonta Sinjoro Jezuo Kristo certe havos multe da heroa karaktero, laŭ la bezono de la epoko.

Kaj nun, ni rigardu nian mondon ! Estas iuj, kiuj malsatante literaturaĵojn, ŝatas militan kuraĝon. Kaj aliaj, kiuj insistante la forigon de armeoj, alktimigas al literaturoj. Estas ankaŭ homoj, kiuj insultante kaj malsagigante la justajn, respektas kontraŭe la ruzflatajn kiel bonulojn. Tiuj, kiuj kuragaŝe rekte konsili kaj juste paroli, estas rigardataj kiel kalumniantoj. Kaj oni uzas la malbonulojn al ĉiuj gravaj konsiloj de la ŝtatoj. Tiuj, kiuj volas elkore malhelpi kaj forigi la erarojn kaj la malfeliĉojn de la lando, estas tamen konsiderataj kiel kontraŭuloj kaj sekve estas subpremataj. La diroj kaj konsiloj de

sanktuloj kaj virtuloj ne estas bezonataj, kaj tial justuloj kaj bonuloj ĉiam silentas, kaj nur flateguloj fariĝas influaj. Lukson kaj frandajn deziras la koro. Oni ŝatas diskuton, sed evitas agon. Tiamaniere la socioj sajnas perej antaŭ niaj okuloj.

En tiu tempo la mondo restus tute mal-luma, se iu granda heroo aŭ savonto ne aperus, ĉar Dia heroo estas praktika realiĝo de ŝtato aŭ socio, kiuj estas efektive la formajo de l'idealaj de tiu grandulo. Ŝtato aŭ socio sen tia heroo tute similas al kadavro sen

povus unuigi ilin kaj regi ilin saĝe kaj bone. Ni ne povas do konfidi tro multe al la popola forto, sed ni nur atendu la aperon de heroo savonto de la mondo.


Sinjoro Jezuo Kristo predikis sur la monto, kaj la popolamaso estis surprizita de lia instruo ; kiam Konfucio publikigis sian ĉefan verkon, tiamaj militemaj malbonuloj ektimis, ĉar la ambaŭ sanktuloj aperis antaŭ la popolamasoj ne kiel kleruloj, sed kiel aŭtoritatuloj. Kaj nun la mondo denove atendas la grandan miraklon.

La nunaj popoloj lacigis per la vanaj babiloj de siaj delegitoj. Kaj la popoloj, la homaro, atendas avida ne la parolaĉantojn pri lia mizer, sed la aperon de tia homo, kiu povus montri al ili la bonan vojon per Dia aŭtoritateco. Ĉe Dio la diro fariĝas ago.

Neniel fruktodone estas vane krii kun la popoloj kaj danci kun ili. Tio estas tute vanta. Ni ne hontu tion ripeti al tiuj, kiuj volas gvidi la popolojn al la paca vojo.

Karaj filoj Miaj, filoj de Dio, ne agu per la simpla instigado, sed estu toleremaj kaj atendu la revenon de Kristo, kiu aperos baldaŭ en la mondon, kiel heroo de Dia karaktero. Amen ! »

Kaj li malsupreniris de la tribunuo ; kaj la muroj de l'ĉambro tremis pro la forta, varma aplaŭdado de la aŭskultantaro.



Sankta Majstro Deguĉi meze de alilandaj vizitantoj.

animo. Senspirita korpo rapidas al sia perejo, pro la obstinaj pasioj kaj avareco. Tiel same ŝtatoj velkas kaj disfalas, mi opinias, pro la manko de sankta heroo, kiu povus ilin saĝe regi.

Al la nuna mondo mankas nek civilizacio nek industrio aŭ armeo, nek pastroj aŭ misiistoj, kaj tamen la hodiaŭa degeneriĝo kaj malboniĝo estas rimarkinde grandaj. Kial do ? Resume, tio estas la manko de tiu grandulo, kiu perfekte komprenus la veran sencon de homaj ŝtatoj kaj socioj, kaj tial

(El « La Rakontoj el la Spirita Mondo » verkita de S-ro Deguĉi.)

LA Kvar OOMOTO-Devizoj ;

1. Purigado : Anima kaj korpa.
2. Unuigo : Harmonigado de la sociaj klasoj.
3. Optimismo : Sin apogi sur la aranĝo de Dio.
4. Progresemo : Bonigado de la socio.

2). Sankta Vivo de Majstro Deguĉi

En la somero de sia 23-jara vivo, li servis ĉe unu veterinaro por rekompence profiti la instruadon, sed la veterinaro verdire ne lin instruis, sed uzis lin por paŝti sian brutaron dum la unua jaro. Nur poste li havis okazon lerni ĉe li kaj nokte li studis ĉe la najbara loĝanto, Korehira Okada, japanan klasikan literaturon.

Post du jaroj li revenis en sian vilaĝon, kaj pruntericevinte monon, li fondis laktejon. Ĉiun laboron li faris mem, li nutris kaj melkis la bovinojn, li vendadis la lakton. Kaj nokte li studis la verkojn pri religio kaj filozofio, kiuj tamen neniel kontentigis lin.

En julio 1897 mortis lia patro, kaj nun al li kiel al la plej aĝa filo restis la respondeco por vivteni la tutan familion, kaj tiom pli li estis okupata.

En aŭgusto de la sama jaro, li vizitis ĉiunokte la vilaĝan sanktejon kaj petis de Dio instruojn. Post tri semajnoj li ekkomprenis la jenon veron :

1. Observu la verajn fenomenojn en la universo, kaj konsideru la korpon de Vera Dio.

2. Sciuj ke ĉia funkcio en la universo estas tute senerare, kaj konsideru la forton de Vera Dio.

3. Komprenu la animecon de vivaĵo, kaj konsideru la animon de Vera Dio.

De tiu ĉi tempo li tre forte kuragiĝis kaj fervore predikis la Dian vojon, sed neniu volis aŭdi lin kaj kelkfoje oni lin konsideris frenezulo aŭ trompulo, kaj eĉ liaj amikoj forlasis lin.

Sed lia kredo per tiuj suferoj plifortigis kaj firmiĝis.

Vere lia tuta dudeksepjara vivo estis nur unu ĉeno de suferoj, laboro kaj batalo.

Kvankam li mem multe suferis de fortuloj, li tamen ĉiam defendis kaj batalis por la malfortuloj.

La 8-an de februaro 1898, li estis atakita nokte de kelkaj malbonuloj, batita kaj forte vundita pro lia helpemo al malfortuloj. Kaj la venontan tagon lia familio lin admonis, kaj li mem pentis pro lia deziro helpadi al ĉiuj kaj savi la mondon.

Dum la pentado li perdis duone la konscion kaj estis en la ekstazo. Tiam aperis al li homa estaĵo en eŭropa vesto, kiu, post interparolo kun li, gvidis lin al monto Takakuma ne malproksima de lia domo. Lasinte lin tie en kaverno, la estaĵo malaperis.

Tie en unusemajna asketisma periodo, lia animo vagis en la spirita mondo, spertis kaj

exploris la staton de ĉiela regno kaj infero, kaj komprenis sian mision kiel savonto de la mondo.

Kaj en tiu ĉi asketisma periodo li gajnis la forton kaj la eblecon travidi la estontecon same kiel la estintecon kaj estantecon de la mondo.

Kiam li revenis post tiu ĉi tempo hejmen, la tuta familio kaj la parencoj, kiuj estis tre maltrankvilaj pro lia malapero, superŝutis lin per demandoj, sed mirinde lia korpo rigidigis de la frumateno de la 17 februaro, kaj ne povis eĉ elparoli unu vorton, kvankam lia konscio estis tre klara kaj povis aŭdi la tiktakadon de poŝhorloĝo.

Tiu stato daŭris dum tri aŭ kvar tagoj, dum kiuj venadis diversaj vizitantoj, kuracistoj kaj spiritistoj, kaj ili faris preĝojn kaj diversajn konsilojn, kiuj tamen neniom lin helpis.

Siaflanke li volis diri al ĉiuj, ke li ne estas malsana, nur li kuŝas pro la asketismo, kaj li volis levigi por mirigi la ĉeestantojn, sed nek lia korpo moviĝis, nek lia buŝo malfremiĝis. Fine iu parenco piedbatis lin, tordis la nazon kaj eĉ turmentis lin per la fumo de pinarbaz folioj ! Tiam lia patrino Jone-ko envenis kaj ilin haltigis, kaj ŝia plorerio falis sur lian vizaĝon kaj per tio li vekigis kaj lia korpo malrigidigis !

Post tiu ĉi okazintaĵo li ne plu okupis sin per paŝtado kaj melkado de bovinoj, sed

OOMOTO

Klarigoj.

La signifo de la vorto « Oomoto » estas bazo, centro, fundamento, t. e. la bazo de Oomoto-movado estas la venonta ĉiela regno. Oomoto kaj ĝia instruo ne volas esti fiksita dogmaro sed ĝi pretendas alkonfirmiĝi al ĉiu progreso sur spirita kampo. En majo de pasinta jaro, okazis interreligia konferenco en Pekingo, sub la aŭtoritata prezidado de Sinjoro Onisabro Degučĉi. La konferenco kreis la Ligon inter la Religioj. La celo de tiu ĉi ligo estas ĉefe la tutmonda paco. Precipe oni aŭdigi la kritikon dum tiu ĉi konferenco, ke la ĝisnunaĵ religioj ne kapablis malhelpi la teruran militon de 1914. La ĉefa celo de la Ligo de Religioj estas la malhelpo de refoja hombuĉado.

La sekvantaj religioj estis oficiale reprezentitaj en Pekingo: Konfucianoj, Tao-anoj, Budhanoj, ĉinaj Kristanoj, Mahometanoj, Lama-anoj (Mongoluloj), Tao-Yuan-anoj (Tao Yuan estas la nomo de nova kaj rapide kreskanta spirita movado en Ĉinujo marŝanta brako ĉe l'brako kun Oomoto), U-Shen-anoj (nova branĉo de la movado Tao-Yuan). Plue, la movado Hutem-Kjo, nova religio de Koreo, aliĝis al la Japana novspirita movado (ĉ. 6 milionoj da adeptoj); Swastika, alia nova ĉina sekto kaj aliaj malpli gravaj sektoj grupiĝis ĉirkaŭ Oomoto.

Post tiu ĉi konferenco, oni fondis la Universalan Homaman Asocion, ĉe la sino de Oomoto-movado. La U. H. A. eldonis manifeston « al la tuta homaro », parolanta rekte al la koro de ĉiu vera homo. Komitatano de U. H. A. troviĝas nuntempe en Eŭropo kaj li vizitos versjane ankaŭ la germanajn disĉiplojn.

Rilate al Oomoto kaj la germana novspirit-movado, ni citas kelkajn leterfragmentojn el la korespondado de la ĵurnalo *Blanka Standardo* kaj la Oomoto-Oficejo en Japanujo. Esperanto montriĝis tie ĉi ankaŭ mirinde praktika helplingvo. Jen parolas la letero adresita al la « ŝatataj germanaj gefratoj »: « ... Nia ĝojo estas granda vidante la prosperon de via movado tiom proksima al la nia. Via sincereco kaj via evidenta entuziasmo instigas nin rekonni vin kiel gefratojn laborantajn por la samaj idealoj. Ni firme deziras marŝi kun vi brako ĉe brako kaj ni esperas, ke la kunigo de niaj du movadoj alhelpos al la rapida spiritiĝo de la mondo... »

Pri la ĉiela regno en ni.

Oomoto estas por la malproksima Oriento ĝuste la sama afero kiel Novspiritismo por Eŭropo: *la nova spirita movado kontraŭstaranta la malsukcesantan materialismon.* Oomoto volas redoni al la homo la fidon al la spirito kaj al la nemortemo kaj ĝi celas konstrui novan mondon sur tiu ĉi bazo, mondon plenan de paco, ĝojo, feliĉo kaj harmonio, fidele al la plej alta aksiomo: *Dio estas spirito kiu sin trovas en ĉiu ero de la Universo kaj la homo estas reganto de la mondo. Ju pli Dio manifestiĝas en homo je des pli alta potenco super la naturo, la homo estas allasata.*

Ne estas do mirinda afero, ke la instruoj de Oomoto pri la en la homo ardanta dia fajrero preskaŭ plene agordas kun la instruoj kaj principoj de la germana novspiritmovado. Plenrajte Oomotoj parolas pri Dia regno, la *ĉiela regno en ni*, kaj ĉiu novspiritano konsentas al la sekvantaj instruoj:

Paradizo floras tie, kie homo kaj Dio amas unu la alian, kie ili ambaŭ kunigas en homa koro. La ŝtupoj de la homa evoluado estas longaj, tamen unufoje ĉiu homo alvenas al tiu ĉi *kunigo kun Dio*. La ĉiela regno manifestos sin al ĉiuj homoj, sed ne en la sama formo kaj ne en la sama loko de la vasta Universo.

Ĉiela regno.

Ju pli la homo esprimas la dian harmonion, des pli li kunigas kun la ĉielo, kaj ju pli li realigas en si mem la ĉielan regnon, jam tie ĉi, sur la tero kaj antaŭ la morto kaj poste, kiam, rapide trapasanta la mezan regnon, la homo alvenas al la ĉiela hejmo.

Nenio povas perdiĝi en la Universo kaj nenio povas resti senmova. Ĉio moviĝas periode en homa animo, laŭ la eterna ritmo: ankaŭ la *homa animo moviĝas*. Pro tio, la homa animo revenas periode surteren, simila al akvoguto de pluvo. Kelkaj personoj eble faros kritikon de la reenkorpiĝo, dirante, ke estas necese paroli pri reenkorpiĝo, se la homo scias nenion pri sia antaŭa vivo.

Oomoto instruas la *nemortemon* de la dia spirito en la homo kaj ke la homo *regajnas* sian memorkapablon pri la antaŭaj vivoj en la momento de la eniro en la ĉielan regnon. Pli ekzakte, en la homa animo jam ekzistas konscio pri la antaŭa vivo sed ĝi ne estas vekiginta. Vere, tiu ĉi rememoro nenion utilas, sed eble domaĝas al la meza homo. Sed kontraŭe, kiam la homo realigas en si la ĉielan

regnon, la dia fajrero en sia koro ekflamas, tiam la homo subite ricevas la rememoron: la spirita homo posedas *Dian Scion*.

Neeble estas al la homa cerbo kompreni la verajn kialojn de tiuj ĉi misteroj, nek homo povas ekkoni ĉiujn regionojn de la vasta Universo.

Kiam la ĉiela regno naskiĝas en la homo — novspirita movado diras: kiam Kristo ekvivas en ni — la homo fariĝas integrala parto de la Universo. Tiam nur li scios la kialon de la vivo. La celo de la homo sur la tero estas la rekonio kaj la ekklamigo de la dia fajrero en sia animo. Ĉiu homo estas *vivkapelo de Dio* kaj li devas konsciĝi pri tio! Lia tero celo estas do la kreado de la *paradizo sur la tero en si mem kaj ĉirkaŭ si*. Nur sub tia kondiĉo la homo povos eniri la ĉielan regnon post disfaldo de sia polvokorpo, nur tiam la homo alvenas al la plenumo de sia memo...

REMARKO. — La ĵurnalo *Weisse Fahne* (Blanka Standardo), grava religia revuo de Germanujo, publikigis tiun ĉi artikolon en sia 12-a kajero de la pasinta jaro. La numeroj 7, 8 kaj 11 ankaŭ entenas bone redaktitajn notojn pri Oomoto kaj en la estonto oni eĉ intencas aperigi specialan numeron pri niaj instruoj. Sinceran gratulon kaj dankon al la Redakcio!

LEGU, ABONU, KUNLABORU, PROPAGANDU kaj STUDU OOMOTON!

De la force de la parole

Les mots sont à l'origine de toutes choses, donc faites attention à eux.

S'ils engendrent la joie, la prospérité et la paix, ils amènent aussi le chagrin, la faiblesse, la discorde et la ruine. Et l'épée, et les démons, et la ruine proviennent de la bouche. Rien n'est aussi effrayant que la parole. Elle est l'enfer du corps, celui de l'âme, d'elle sort le chemin qui y conduit.

Avec la bouche l'homme se moque des hommes. On félicite l'homme qui avec la bouche se moque des hommes, en outre on l'admire, puisque l'homme est enfant de Dieu; le railler, c'est railler Dieu lui-même. Mais il arrivera un malheur inattendu au raillleur! Il faut donc s'abstenir de la moquerie. L'homme, enfant de Dieu, ne doit pas détester ses frères terrestres, ni les jalouser, ni les railler. L'homme qui dit des mauvaises choses de ses semblables, dévoile au Ciel son cœur mauvais et obscur. Celui qui rit dans le chemin de Dieu, étant juste et altruiste d'habitude, dira toujours de bonnes et belles paroles. Il entretient des bonnes relations avec ses frères, par conséquent, il est bon pour tout le monde.

L'homme qui propage la religion pèse toutes choses; la justice et l'injustice, la raison et la déraison, le bien et le mal. Ainsi il fait attention à ses paroles et à sa conduite.

La conduite et la parole du missionnaire ressemblent à un feu qui brûle la plaine inculte. De même qu'une parcelle de feu, en un clin d'œil, enflamme une grande cité, la parole et l'acte du missionnaire puissant, dirige le monde.

Vous cherchez la popularité et l'amitié des hommes, mais sachez que la plus grande vérité et la plus grande beauté n'égalent pas la vertu de Dieu.

En outre, si les vérités concordent avec la pensée de Dieu, elles ne s'accordent pas nécessairement avec le cœur des gens vulgaires. La bravoure, le courage et la bonté de l'âme sont nécessaires.

(Traduit du Japonais, des œuvres de M. O. Degučĉi.)

Homo devas ĉiam fidi al Dio, ĉar la vera fido estas la plej fortika kaj findinda apogilo en okazo de bezono.

ONISABRO DEGUČĈI.

lupreninte ĉambron ĉe sia amiko, li sin dediĉis al spiritaĵ ekzercoj kaj komencis instrui la Diajn vortojn donitajn al li sur la monto Taka-kuma!

Malgraŭ la altaj pensoj kaj instruoj oni ne atentis lin en la vilaĝo, sed li plue dediĉis sian tempon al la vilaĝanoj kaj kiel Jesuo li spirite kuracadis kriplulojn, blindulojn kaj lamulojn. Liaj mirakloj estis tre multnombraj, kaj baldaŭ lia famo disvastiĝis en la regiono!

En tiu tempo li iris en la grandan urbon Oosaka, kie li daŭrigis la instruon de Diaj vortoj, kaj klopodis al malsanuloj la forigon de malbonaj spiritoj.

Pri lia vivo kaj bonagado en Oosaka oni ne povas detale skribi en mallonga skribo, tiom ĝi estis ampleksa.

Ni donos nun unu ekzemplon pri lia renkonto kun unu aŭguristo, kiu okazis en marto 1898 en tiu granda industriurbo.

Unu tagon junulo venis el vilaĝo al Oosaka, granda urbo, kie li tuj dum kelkdeko da tagoj elspezis sian monon, kaj nur restis al li iom pli ol unu jeno (8 fr. frankoj). Li vagis al la urba sanktejo, kie li aĉetis per la lasta monero fiŝojn por la sanktaj gruoj kaj pizojn por la ĉevalo. Kiam li donis la manĝaĵojn al ili, unu maljunulo blankhara, sidanta ĉe la tablo malgranda, vokis lin. Li estis aŭguristo, kaj li diris al la junulo: « Vi devas esti el la provinco Tamba, estas ankoraŭ tro frue por vi

veni tien ĉi por propagandi Dian vojon! Revenu hejmen tuj, kaj post dek jaroj de ekzerco kaj studado venu tien ĉi, kaj tiam vi sukcesos! Nun ne estas la tempo tion fari. Neniel rapidu nun sukcesu ».

Pro emocio li ploretante klinis la kapon antaŭ la maljunulo. Kiam li relevis ĝin, ne plu li retrovis la maljunulon, nek la tablon kun la elpendaĵo! Kaj li pensis, ke tio estis Dia aperaĵo, kaj li rememoris al si la pasintan okazintaĵon sur la monto Taka-kuma, kie li ricevis Dian instruon, kiu resumigas en jenaj vortoj:

En la nuna malboniĝinta mondo vi devas propagandi Dian vojon tra la mondo kaj vekigi la tutan homaron. Se Vi ne obeos Dian ordonon, la mondo pereos. Sed dum dek jaroj Vi devas studi pli profunde kaj ekzerci pli firme la Dian vojon. Dum tiu tempo Vi havos malhelpojn kaj persekutojn, sed Vi devas elteni tion por plenumi la Dian mision.

En la nuna malboniĝinta mondo vi vizitis la konatan klerulon de klasika literaturo S-ron Tateo Nagasaŭa, en la provinco Ŝizuoka, kies patrino donis al li testamenton de S-ro Cika-aro Honda, kiu diras en ĝi jenon: Dek jarojn poste aperos junulo en la provinco Tamba, kiu disvastigos Dian vojon. Tamba-provincan havas jam de pratempe gravan kaj profundan rilaton al Dia vojo, kaj tial ĝi disvastigos el tiu provinco.

(Daŭrigota.)

ESPERANTO-MONDO

Redakcio kaj Administracio : 4, rue de Vaugirard, PARIS (VI^e)

PER SANGO AŬ PER AMO ?

Gandhi. la hinda ĉefo, elektis la vojon de la amo, kiam li memvole eniris karceron en la jaro 1922. Granda Mahatma Gandhi, vi fariĝis ankoraŭ pli granda, ĉar vi estis kontraŭ ĉiu speco batalado kaj vi pli faris por la liberigo de via lando ol vi estus kapablinta atingi per militado ! Kelkaj apostoloj de la amo malaprobis ĉiun specon de militado, havu ĝi kian ajn belan nomon. Ĉu oni ne ĉiam bataladis en la nomo de altaj idealoj ? La batalo senhonorigas la plej belan idealon ! En la nomo de la kruco milionoj mortis en la Mezepoko, en la nomo de la klasbatalo eble aliaj milionoj mortos en la fiera pri sia « civilizo » epoko...

Fratoj, Kristianoj kaj Marksistoj : ne konsentu mortigon pro viaj devizoj ! Aliĝu al la Paco-armeo, kiu estas Oomoto. Ni scias, ke la monistoj trovas nin tre spiritaj kaj la dualistoj trovas nin tre materialaj, sed nia celo estas ne nova batalo, sed la Paco. Ĉu Esperanto, kreita de granda pacamanto, de D-ro L. L. Zamenhof, homamanto kaj pacifisto, povus havi pli belan aplikadon ol la unuigon, de la mondo sub la standardo de unu sola religio ? La celo de la Majstro kreinta Esperanton estis rekte la sama. En sia belega poemo « Sub la Verda Standardo », li — per iu mirinda koincido — elparolis la fundamentan principon de Oomoto ! Ĉu li ne parolis pri la mistera sento, kiu suloras al ni, ke en ĉies animo dormadas dia fajrero kaj ĉu li ne klopodis ekflamigi tiun ĉi dispiriton per sia varma amo al la tuta homaro ? Esperantistoj, disĉepoj fidelaj de la Majstro, aliĝu al Oomoto, subtenu nian junan jurnalon !

En sia belega biografio pri Zamenhof, D-ro E. Privat ekkrias : « Kiu daŭrigos la verkon de la Majstro por la Interna Ideo kaj por la Homaramismo ? » Estas tre evidente, ke Oomoto estas la Homaramismo mem kaj se la Majstro vivus, li estus la unua, kiu aliĝus al S-ro Deguĉi !

Esperantistoj, ĉu vi do povas heziti ? J. M.

Heroldo de Esperanto

Horrem b. Köln (Germanujo)

ESPERANTO

OFICIALA ORGANO DE LA
Universala Esperanto-Asocio

LA PLEJ BONA MONATA
ESPERANTA JURNALO

LEGU, ABONU, ABONIGU

12, Boulevard du Théâtre - GENÈVE

La rolo de OOMOTO en la Esperanta Movado

Oomoto, krom sia morala helpo, alportas ankaŭ efektivan helpon al la propagando de nia kara lingvo en Japanujo.

Krom nia jurnalo aperanta en Parizo, du aliaj periodaĵoj aperadas en Japanujo.

« Oomoto » estas la centra organo de le Oomoto-movado, aperanta en Ajabe. Malgrandformata, sed bele presita, ĝi aperas monate kaj entenas ĉiuspecajn utilajn instruojn pri nia movado. Elirinta deponat la komenco de la pasinta jaro, la kolekto de tiu ĉi jurnalo reprezentas valoran literaturon en Esperanto, konindan de ĉiu amiko de Oomoto.

« La Verda Mondo » estas propaganda organo por Esperanto, eldonita de la Esperantista Propaganda Asocio en Ajabe. Redaktita en Esperanto kaj en japana lingvo, ĝi estas bonega organo kaj por la propagando kaj por la perfektigo de niaj japanaj gesamideanoj. Rimarkindaj estas la numeroj 10, 11 kaj 12, enhavantaj artikolojn de nia redaktoro, S-ro Nišimura, pri sia vojaĝo al Eŭropo lastan someron. Alia interesa artikolo de Samideano T. Juri temas pri la urbeto Ajabe, lulilo de la Oomoto-movado.

Ambaŭ jurnaloj povas esti abonataj pere de nia Redakcejo.

Krom la gazetaro, Oomoto helpas ankaŭ per aliaj efikaj rimedoj je la disvastiĝo de Esperanto, la devo de la Esperantistaro estas do subteni tiun ĉi veran kulturmovadon, des pli, ĉar ĝi estas en plena konkordo kun la Zamenhofa Idealo.

Laŭ la plej novaj raportoj el Ajabe, ni scias, ke Oomotanoj Esperantistoj estas treege okapataj gvidante kursojn tra tuta Japanujo por la disvastiĝo de nia lingvo, krom la ĉiuvesperaj kursoj, kiujn ili okazigas en Ajabe dum la jaro.

Lastan vintron Majstro Deguĉi akiris grandan domon trietaĝan en Kameoka, por kursejo de homaramiga lingvo Esperanto. Ni pensas, ke tempo estas proksima, kiam Sankta Majstro Deguĉi invitos Eŭropajn samideanojn al sia loko. Tio estis jam proponita de S-ro Nišimura, kaj publikigita en « Esperanto » de U. E. A. lastan aŭtunon.

La sola esperanta gazeto de bonhumoro

(kun bildoj) monate aperanta estas

La Ridanta Esperantisto

ELZE, en HANNOVER (Germanujo)

kiu estas sendata en pli ol 60 landojn en 5 kontinentoj.

ABONPREZO : 4 respondukuponigo (aĉetablaj ĉe la poŝt-oficejoj) aŭ la egalvaloron en bona valuto; deponat 1-4-1926 : 6 respondukuponigo po duonjaro aŭ la egalvaloron. Rekomendinda pagmaniero poŝtmandate aŭ per registrita letero.

EL NIA AGENDO...

Impoza nombro de leteroj alvenis al ni, neeble estas respondi ĉiujn ! Jen kelkaj interesaj eltrojaĵoj :

S-ro Eyquem, tiu ĉi « Nestoro » de la francaj Esperantistoj, skribas : « ... Pli kaj pli mi ŝatas Japanujon ; ĝian moron kaj ĝian sintenadon de reala, facila kaj natura gentileco... Mi estas tute ravita, legante : « La homoj estas la folioj de la sama arbo, la floroj de la sama ĝardeno ». Kiel gracia estas la esprimo de tiu ĉi filozofia vereco, kiel poezie vi diras tiun ĉi profundan kaj humanan ideon. Neniu popolo en la mondo povus trovi tiel delikate elektitajn esprimojn ».

S-ro W. R. Jackson el Cheltenham skribas : « Ĉu vi povas skribi al mi, kion la Japanoj pensas pri la orientaj nacioj ? » Jes, eble ni povas rezumi ilian penson dirante : « En Eŭropo estas tro da civilizo kaj ne sufiĉe da kulturo ! »

S-ro Staned el Sevlievo (Bulgarujo) skribas : « ... Grandioza estas via iniciativo kaj mirinda estas via plano. Mi ne povus ne laŭdi la homojn, kiuj oferas sian tutan vivon por la bono de la tutmondo. »

Inter via tagmanĝo kaj politika kunveno, ĉu vi ne volas dediĉi 10 minutojn je la lego de nia jurnalo ?

OOMOTO venkos sen vi, vi ne estas feliĉa sen OOMOTO !

RECENZOJ

En tiu ĉi rubriko ni koniĝe raportas pri ĉiuj al ni po duekzemplere alsendotaj libroj. Verkoj en aliaj lingvoj ankaŭ akceptataj.

L'Information Esperantiste : dusemajna inform-bulteno por la taga gazetaro pri Esperanto. Interesemuloj turnu sin al la Ĉefdelegito de Parizo.

Heim und Welt, germana ilustrita jurnalo, en sia 28-a N^o enhavas plej parte bildojn kaj tekston rilate al Esperanto.

Esperanto, de Jerusalemo, redaktite hebree sed kun Esperanta titolpaĝo. Bedaŭrinde ni ne komprenas.

Katolika Esperantisto, de Paris, jan. 1926.

Oeffentlicher Anzeiger de Bad-Kreuznach (Germ.) N^o 260, artikolo pri Oomoto.

Mysl Wolna, pola periodaĵo : artikolo pri Esp., de S-ro Wiesenfeld.

La Verda Mondo, nov. 1925. Esp. Prop. Asocio, Ajabe (Japanujo).

Origino de Oomoto, eldonita de Oomoto Oficejo en Ajabe (Japanujo). Tiu ĉi broŝuro donas tre kompletajn informojn pri la esenco de Oomoto.

La Movado, okt.-nov. 1925, france redaktita propaganda organo.

Javaj legendoj kaj fabeloj, de Liem Tjong Ilie, mendebla de Tjong Ilie Liem, Semarang (Java).

Fine ni ricevis broŝuretojn de la nova lingvaĵo fabrikita de S-ro G. Peano, kiun ni bedaŭrinde ne komprenas.

Le Gérant : HENRI SELVES

Centra Presejo Esperantista (V. Polgar), 33, rue Lacépède, Paris, V^e

